

N I A V O Ĉ O

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º 28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde-vespere
aliajn tagojn, aŭtomata respondo

Redaktas kaj aranĝas Lupe Sanz

DECEMBRO 1997

KRISTNASKA LOTERIO Nº 45.680

Nur ĝis la 15-an de decembro ni rezervas la
Loterion kiu helpas ekonomie al la Liceo.

LICEO TRANSLOKIĜAS

La daŭra altigo de la kosto de la luado de nia sidejo, la sinsekva malmebriĝo kaj forgeso de pago de la jara kotizo kaj la decido de la koruso "Verda Stelo" ne plu uzi ĝin, faris ke la ekonomio de la Liceo ne permesus pagi luadon de nia sidejo de Atocha 98. La oficiala sidejo, se oni aprobas en la asembleo okazota en Januaro, estos ĉe la Prezidantino.

EKDE FEBRUARO NI KUNVENOS, LUNDE-19.00 H, ĈE HEF-CO. RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7

JAM 117-EP-ANOJ ATENTAS ESPERANTON

Dank'al la informa kaj koresponda agado de Germain Pirlot (Belgio) kaj liaj kunlaborantoj, la nombro de eŭro-parlamentanoj pretaj konsideri Esperanton "por helpi al la solvado de la lingva problemo en Eŭropa Unio" kreskis, ĝis la 1-a de septembro, al 117 (18,7% el ĉiuj 626). Ili troviĝas en ĉiuj politikaj grupoj de Eŭropa Parlamento kaj devenas el ĉiuj 15 membroŝtatoj de EU. Plej grandnombros la subtenantoj britaj (30) kaj italaj (29), sed proporcie daŭre pli fortas la subtenemo ĉe irlandaj (13 el 15) kaj belgaj (15 el 25) eŭro-parlamentanoj ("Esperanto" oktobro 1997)

OMAĜOJ AL ADA

Multaj tra la mondo omaĝis al la memoro de Ada Sikorska-Fighiera forpasinta antaŭ pli ol jaro, la 7-an de a 1996. La Internacia E-Kongreso okazinta en Valencio (Hispanio) kaj la UK en Adelajdo (Australio) donis ŝian nomon al kunvensalono; en la UK Jadwiga Gibczynska ludis teatraĵon bazitan sur ŝia taglibro. Pola Radio rememoris pri ŝi dum plena dissendo la 1-an de novembro.

HEF ANGULO

Post ok jaroj, Antonio Marco Botella transdonas la dumonatan "Boletín" de Hispana Esperanto Federacio al Miguel Gutierrez Adúriz (Floranés 57-2-C. 39010 Santander, <liven@nexo.es>



Pequeño libro en español "Pro Esperanto", redactado por el coordinador de K+E, y que acaba de ser editado por la Federación Española de Esperanto. 80 páginas de tamaño A5, con 132 ilustraciones. Precio, 200 pesetas.

Denso informe sobre:

- El problema de la comunicación lingüística internacional.
- El posicionamiento de los usuarios y abogados del Esperanto en relación con ese problema.
- Opiniones y argumentos pro y contra el Esperanto.
- El funcionamiento y la vida del Esperanto

Se permiten la traducción o la adaptación total o parcial, preferiblemente por acuerdo con HEF. En todo caso se agradecerá la cita de la fuente y el envío de un ejemplar.

HEF suministrará con agrado a eventuales traductores las diskettes de ordenador con las ilustraciones (de las que 100 se pueden usar directamente, y las demás son más o menos fácilmente adaptables del español).

Madrida Esperanto-Liceo helpis al HEF-CO en la disdonado de ekzempleroj de "Pro Esperanto" jam estas distribuitaj al anoj de Madrida Autonoma Komunumo, Hispanaj Eŭro-parlamentanoj kaj Deputitoj. Entute pli ol 400.

HISPANIO

1-a Literatura Konkurso en Esperanto "Francisco Máñez". La Ateneo Cultural "La Alianza" de **Cheste** (Valencio) decidis disdividi la premion (250.000 ESP) inter tri gajnintoj:

- Antonio Marco Botella "Kronikoj pri Cheste esperantista"
- Kurusu Kei (Japanio) "Iom longa rakonto pri leteroj"
- Sabira Stahlberg (Bulgario) "Kontoj el mia popolo"

*Ĝojan Kristnaskon
kaj feliĉan
Novan Jaron*



En vilaĝo de **Huelva** instruis bazan kurso José González (Badajoz), nun li preparas du novajn kursojn: baza kaj meza en Huelva kaj ankaŭ en Badajoz (Universitato, Lingva Lernejo kaj Popola Universitato). En **Badajoz** li kreis E-grupon "Amigos del esperanto".



ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

En la ĵurnalo "La Nueva España" de Avilés, aperis intervjuo al Nicolás Muñiz, prezidanto de la grupo "Antaŭen". Li gvidis debaton titolita "Esperanto: El debate sobre el dominio de las lenguas universales"

EKSTERLANDE

DOCE. Oficiala Bulteno de Europa Unio.C 319/971018) kiel respondo al demando de Caroline Jackson (PPE) la Komisiono diris ke Esperanto kiel artefarita lingvo ne povas atingi subvencion por minoritataj lingvoj.

NOVA E-REVUO

Esperanta Jura Asocio kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĵus eldonis kiel oficialan organon de tiu unua asocio, la revuon "Juro Tribuno Internacia". Ĉi revuo pritraktas jurajn temojn kaj ĝi volas esti la jurista voĉo de nia movado. Momente EJA programas aperigi unu numeron jare, dum la UK, kun resumoj en la hispana, franca kaj angla. La direktoro estas José MARÍA Rodríguez Hernández (joser@lander.es)

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Dum Decembro kaj Januaro, Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde ~~Ekde Februaro, ni kunvenas en~~ **HEF-CO** Marde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

Ekskurso: 14-an de Decembro. "Fiesta de las migas" Jadraque (Guadalajara). Facile atingebla per traino. La koruso "Verda Stelo" konkursis.

Kursoj:


- Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
- Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18

URĜA ZAMENHOFA BANKEDO NOVA DATO
Kiel kutime la bankedo okazos en Hotel Puerta de Toledo la 13-an de decembro (14.30 h). Interesatoj telefonu al Pepe Platas 468 51 63

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Atocha 98-4º
 28012 Madrid
 Asociación de Utilidad Pública Municipal

MONTPELLIER, URBO DE LA UNIVERSALA KONGRESO



Venontjare la hispanaj geesperantistoj, kaj ĉefe tiuj loĝantaj en Katalunio kaj la Valencia Komunumo havos la eblecon partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en MONTPELLIER (Francio)

Situata en la regiono de Languedoc-Roussillon, ĝi estas facile atingebla post kelkaj horoj da vojaĝo per automobilo. Tuj trapasante la hispanan landlimon vi trovos malsimilan mondon kaj vi povos trakuri pejzaĝojn kiuj donos al vi tre agrablajn surprizojn.

Venu por koni tiun belan francan regionon kies ĉefurbo Montpellier gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto por la venonta jaro 1998.

Grava historia kaj universitata urbo, Montpellier havas multajn kaj vizitindajn lokojn, inter kiuj ni povas mencii la Muzeon Fabre, la Katedralon, la Universitaton kaj, la Malnovan Kvartalon, tre bone konservata kun konstruaĵoj de la 17a kaj 18a jarcento.

Proksime situas urboj kiel Perpignan, kun tre ĉarma malnova kvartalo kaj Palaco de la Reĝoj de Majoroko, Narbonne kaj Nîmes, ĉi lasta kun pluraj romiaj monumentoj inter kiuj ni devas mencii la Anfiteatron, kie nun estas uzata por la tauroludoj, tre ŝatataj en tiu parto de Francio.


Por amantoj de la naturo, la maro kaj la gastronomio, Montpellier kaj la tuta regiono proponas diversajn eblecojn kaj estu certa ke oni povas trovi tion kion povos kontentigi viajn plej delikatajn dezirojn.

Languedoc-Roussillon estas vere paradizo por somerumado kaj oni devas kapti la okazon por partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en MONTPELLIER kaj tiel, havi eblecon, koni regionon el Francio plej proksima al Hispanio kiu havas, lingve kaj kulture, tre intimaj rilatoj kun Katalunio.

L. HERNANDEZ

"Fido kaj Espero". (Bulteno de la Valladolida E-Grupo)


Recenzoj



Apoteoza verko reuniga

El miaj sonoraj soloj. Poemoj 1992-1995. Miguel Fernández. Vieno: IEM, 1996. 100p. 23cm. 22,50 gld.

Mi ne povas forgesi kiam, en 1993, en nia beletra areno eksplodis la t.n. "Ibera Skolo" (Camacho, Neves, Fernández, Dek, Montagut, Valén), kiu tiujare akaparis preskaŭ ĉiujn premiojn en la Belartaj Konkursoj. Ĵuriano en ties poezia branĉo, mi memoras miajn miron kaj entuziasmon ĉe la malkovro de tiuj novaj, ekscitaj kaj tradicirompaj poeziaj voĉoj. Aparte min emociis iu poemo, "Iama am' aŭ sonĝo ĉiunokta". Nur poste mi eksciis ke ĝin aŭtoris iu Miguel Fernández, kiu jam vaste aktivis beletre, i.a. per tradukoj de prestiĝaj verkoj, kiel dramoj de García Lorca. Tial, tiun jaron en la Valencia UK, mi volis ekkoni la admiratan poeton. Kaj en Valencio la emocio renoviĝis, klimaksis, pro la premiero de *La profil' de viaj spuroj*, lirika/muzika spektaklo, kie Fernández deklamis sian poemaron (kun la ĉarma Ana Manero) kun akompano de orkestro, impona koruso kaj



Miguel Fernández

du gesolistoj. Ĉe la fino de la spektaklo la tuta salonego spontane ekstaris por

ovacie aplaŭdegi. Kaj la sukceso renoviĝis kiam Fernández, majstre kaj pasie, prelegis pri García Lorca, pliriĉigante sian prezenton per vibra kantado. [Pri lia monografio *Sur la spuroj de Federico García Lorca* vd. p. 176. -Red.]

Sed post tiu eventa jaro mi iom post iom seniluziĝis pri la kroma evoluo de nia poezio, ĝis... finfine, antaŭ nelonge, mi ricevis la kolekton de Fernández. Ha, mi jubilis: mi reunigiĝis, repaciĝis kun mi mem: eble mi ankoraŭ kapablas distingi, juĝi, emociiĝi!

Fakte, laŭ mia modesta pritakso, per ĉi tiu apoteoza verko Fernández ne nur konfirmas sian elpruvitan artisman, sed eĉ elanas avancen, diboĉe transcendas la iom miĥalskieskan kaj nervieman inspiron de la antaŭa produktado; li nun voluptas hiperbole plurĝenre, diversteme, korifeante ne nur pri amo (kie li nepre majstras, al li mi povas apudigi nur Marjorie Boulton), sed ankaŭ pri sociaj temoj (kie lia ne ĉiam facila poezio iĝas pli interparoleca, komprenebla) kaj pri sincere kortuŝaj omaĝoj (al Régulo Pérez, García Lorca, Nervi, de Diego, Neves k.a.).

Kaptus min la tento pluki el liaj poemoj, ĉar ne malofte unuopaj versoj aŭ tropoj estas ĉe li fajnaj poemoj en si mem, sed mi jam sufiĉe panegiris, esperante tikli la deziron de la poezisatantoj aĉeti la libron, por mem malkovri kaj ĝui la entenatan trezoron.

Aldo de' Giorgi (Italio)

Valora, viva ĉiutageco

Verkoj de Ronald Cecil Gates: **Kolera afero.** Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1993. 88p. 21cm. 12,00 gld. **Sep krimnoveloj.** Matraville: AEA, 1993. 84p. 21cm. 12,30 gld. **Morto de sciencisto.** Antwerpen: FEL, 1994. 83p. 21cm. 12,30 gld. **Refoje krimnoveloj sep.** Matraville: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1994. 90p. 21cm. 12,90 gld. **Tria kolekto da krimnoveloj.** Matraville: AEA, 1996. 84p. 21 cm. 13,50 gld.

Temas pri entute du krim-romanetoj kaj 21 krim-noveloj. En la romanetoj, same kiel en la pli frua *La septaga murdenigmo* (1991), polica komisaro Roberto Elis kaj universitata gardisto Petro Tomson kune solvas la murdokazojn de juna ano de ŝtelista bando kaj de mikrobiologo. La aŭtoro uzas tre simplan, bonan kaj fluan stilon dialogecan, kaj li enfokusigas pli la okazaĵojn ol la rolulojn kaj ties psikologion, kiujn li iom supraĵe skizas. Sed Gates celas ne tiom beletron kiom distron, kaj li ja sukcesas teni la scivolon de la leganto pri la identeco

kaj motivoj de la kulpulo. Ekzemple, en *Morto de sciencisto* sursceniĝas almenaŭ ses suspektatoj kaj diversaj eblaj krim-motivoj. La romanetoj okazas en fikcia aŭstralia kampara urbo kaj la proksima universitato. Gates, eks-estro de ĝuste tia institucio, lerte kaj elvoke priskribas la intrigejojn kaj la etoson.

La novelojn la aŭtoro senpretende nomas "tranĉaĵoj el la teksaĵo de la homa vivo, prezentitaj laŭpove en simpla, ĉiutaga Esperanto". Nu, ĝuste la ĉiutageco kaj dialoga viveco estas la plej valoraj aspektoj en ĉiuj verkoj de

Gates. Kvankam informo pri anstataŭa piŝto de ventpumpilo, tute senliga al la intrigo (*Kolera afero*, p. 55), povas ŝajni sencela detalemo, tamen ni konsideru ke — ĉar la plej multaj estoj ne parolas la lingvon ĉiutage kaj ĉiasituacie — tia detalemo ludas en nia literaturo ian paroligan rolon, apenaŭ necesan en nacilingvaj verkoj.

La formojn *sidonemo*, *sidemandado* k.a. en *Tria kolekto*... mi unue pensis tipografiaj misoj, sed Gates ja uzas ilin intence, spite ke pli frue li skribis *sin-gardeco*, *sindorlota* k.a. Mi rimarkis kelkajn anglismojn, kiel *kaplampo* anstataŭ *lumŝetilo/reflektoro*. La uzo de formoj kiel *manĝantis* kaj *ricevantis* feliĉe malpliigis en la pli freŝdataj verkoj. Ĉi tiuj estas ja pli bonaj ankaŭ el struktura kaj enhava vidpunktoj.

Por distriĝi kaj samtempe plivastigi nian ĉiutagan vortprovizon la verkoj de Gates estas tre legindaj.

Bruce Crisp (Kanado)

MEMORIA DE ACTIVIDADES REALIZADAS EN 1997
Esperanto-Liceo de Madrid
(Asociación de utilidad pública municipal)
Atocha 98-4º.28012 Madrid

Entre las actividades llevadas a cabo en 1997 merecen ser destacadas las siguientes:

Diversos miembros del Liceo han colaborado en la organización y han participado activamente en los tres congresos, dos internacionales y uno nacional que han tenido lugar en Valencia y cuyo presidente del Comité Organizador es miembro de honor del Liceo.

Un miembro del Liceo participó como conferenciante invitado en el congreso internacional de SAT en Limoges (Francia)

Se han repartido ejemplares del libro "Pro Esperanto", editado por la Federación Española de Esperanto, a todos los parlamentarios (nacionales, autonómicos y europeos) elegidos por Madrid.

Como aportación al 450 aniversario del nacimiento de Cervantes se regalaron, a la Sociedad Cervantina Madrileña, varias obras de inmortal autor en su versión en esperanto.

A continuación se detallan las principales actividades llevadas a cabo durante 1996 por Esperanto-Liceo de Madrid (MEL).

CURSOS

Cumpliendo con uno de los principales objetivos estatutarios, se han organizado en Madrid cursos de esperanto en los lugares que se citan:

- .- Distrito Argüelles. Federación Española de Esperanto. Curso por correspondencia
- .- Distrito Ventas. Centro cultural "Maestro Alonso"
- .- Distrito Arganzuela. Centro de Día Puente de Toledo
- .- Distrito Centro. Esperanto Liceo de Madrid, Federación Espirita Española y Confederación Nacional del Trabajo

En Segovia un miembro del Liceo impartió cursos de diversos niveles así como uno por correspondencia.

PARTICIPACION EN CONGRESOS Y REUNIONES

Los esperantistas de Madrid asistieron como participantes, y en muchos casos de forma muy activa, a los siguientes congresos y/o reuniones de esperanto:

- .- 56º Congreso Español de Esperanto (Valencia)
- .- 1-er Encuentro de Grupos de Esperantistas Liberales (Coll de Nargó)
- .- Diversas reuniones de la Federación Española de Esperanto (Madrid)
- .- 7º Congreso Internacional de Turismo en Esperanto (Valencia)
- .- 7º Foro Europeo de Esperanto (Valencia)
- .- Congreso Internacional de SAT (Limoges, Francia)
- .- Congreso Internacional de la CNT-Sección Esperanto

CONFERENCIAS

Como es habitual el Liceo organiza conferencias y/o proyecciones de videos o diapositivas comentadas en Esperanto, en especial aprovechando la estancia en Madrid de esperantistas extranjeros. El programa de 1996 incluyó las siguientes:

- .- Guatemala multicolor.
- .- El Congreso de HEF en Valencia.
- .- El parque nacional de Somiedo.
- .- Esperanto, la lengua internacional.
- .- La mejor reforma del esperanto es su uso extra-litúrgico.
- .- El sistema decimal como medida del espacio y del tiempo.
- .- Hacer más fácil las lenguas artificiales.
- .- Nuevo esperanto, sin supersignos y no sexista.
- .- India norte y sur.
- .- Fiestas de invierno.

Durante el Congreso de la Federación Valenciano-Murciana un miembro del Liceo dictó una conferencia

PARTICIPACION EN PRENSA Y RADIO

Varias cadenas de radio (Onda Cero, Intercontinental, etc.) y TV (Telemadrid, TV-Regional de Castilla y León, etc.) han emitido entrevistas con esperantistas madrileños.

Se ha continuado enviando notas a la prensa sobre noticias relacionadas con el problema lingüístico internacional.

Varios esperantistas madrileños son colaboradores habituales de revistas de difusión internacional editadas en esperanto "Literatura foiro", "Itis-forumo", "Heroldo", "Monato", "Kajero el la sudo", "Boletín", "Verda proleto", "Sennaciulo", "Gazeto Andaluzio" etc.

En diversas ocasiones miembros del Liceo han sido solicitados por las revistas en esperanto para el envío de reseñas de libros, editados en esperanto.

PUBLICACIONES

El Liceo ha continuado editando mensualmente su boletín informativo "Nia voĉo" distribuyéndose a todos los grupos esperantistas españoles. Su contenido se ha incluido en una página de internet.

Subvencionado por el Museo Internacional de Esperanto de Viena se ha publicado una antología de poemas, "El miaj sonoraj soloj: Poemoj 1992-1995", de un socio del Liceo.

La Fundación Anselmo Lorenzo ha patrocinado la edición del libro "Novesperanto" escrito también por un miembro del Liceo.

MEL ha publicado una nueva edición corregida y aumentada del "Directorio de Grupos Españoles de Esperanto". El directorio de ha incluido en un apéndice de internet

OTRAS ACTIVIDADES

Colaboración con la Unión Andaluza de Esperanto para difundir, a través de las Cámaras de Comercio, las direcciones de empresas que emplean el esperanto como lengua de trabajo.

Se han celebrado tertulias, una vez por semana, en la sede de la asociación. La oficina de la Federación Española de Esperanto en Madrid también ha colaborado con los miembros de MEL en la difusión y práctica del esperanto en las reuniones que se celebran en su sede y en diversas cafeterías de Madrid. En Segovia un socio del Liceo ha dirigido tertulias semanales.

Se ha colaborado en la campaña de sensibilización de los europarlamentarios españoles en relación al empleo del esperanto como vehículo de comunicación en la Unión Europea.

Varios socios han recibido como huéspedes a esperantistas de diversos países, como miembros de "Pasporta Servo" (Servicio de Pasaporte) que permite el alojamiento en casas de esperantistas.

Dentro del programa socio-cultural de MEL se han organizado visitas, excursiones y encuentros, abiertos a sus socios y simpatizantes.

Esperanto-Liceo de Madrid ha seguido auspiciando al coro y orquesta "Verda stelo", que, con más de diez años de existencia, ha reiterando su apoyo a la difusión del esperanto y de la cultura musical internacional a través de sus actuaciones.

La secretaria
G.Sanz Bueno

Madrid diciembre de 1997